

Manfred Hausmann,

## Adiaŭ

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Ĉe l' pord' ĉe l' flava gruo diris li  
adiaŭ je la lasta foj'.

Aprilo estis kaj la vel-boat'  
forglitis sur la akva voj'.

La velon mi ankoraŭ vidis jen,  
ĝis en la blu' foriĝis ĝi,  
kaj poste nur la larĝon de l' river',  
trembrilon sole vidis mi.

*Traduko de la Germana poemo "Lebwohl" de MANFRED HAUSMANN (\*1898-09-10 – †1986-08-06) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04).*

*Arg-903-1802 (2013-06-29 11:50:59)*